

"Ne facilas esti... Sloveno en Italio" de Anita Perić Altherr
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI ..., 1991.10.03-05

Cl.- Nome de Svisa Radio Internacia parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND. En esperanto malofte aperas libro pri soci-politika problemo, kiam la problemo mem akutas, tre verŝajne, ĉar estus vane atendi de elsendoj radiaj aŭ televidaj aŭ eĉ de gazeto intervjuan apogon, kiel tio ĝenerale okazas kun nacilingvaj verkoj, kies apero koincidas kun dramigebla okazaĵo. Sed kelkfoje estas escepto, kiel nun kun la libro de Anita PERIĆ ALTHERR titolita "Ne facilas esti...sloveno en Italio". Ĝi eĉdoniĝis ĝuste kiam ĉies rigardoj estas turnitaj al la jugoslavia krizo. Ĉiuj konsultis geografian karton por malkovri, kie ekzakte situas Slovenio, ĵus proklaminta sian sendependiĝemon. Certe vekos la scivolemon de la esperantistoj libro, kiu malkovrigas, ke slovenoj ankaŭ vivas en Italio, kaj ke ilia tiea vivo ne estas facila.

A.- Anita PERIĆ ALTHERR estas bone konata en la svisa esperanto-movado, tio sub la nomo Anita MAZE. Kaj ni scias, ke jam ekde multaj jaroj ŝi komencis pretigi sian raporton pri la vivo de la slovenoj en Italio. Ŝia libro do neniel rezultas el provo urĝe liveri dokumenton por profiti pri politika evento reklamiga.

Cl.- Naskiĝinta en Triesto en 1928 Anita PERIĆ dum sia infanaĝo travivis la kontraŭslovenajn persekutojn de la faŝisma reĝimo. Post la dua mondmilito malgraŭ pli favoraj leĝoj ŝi konstatis, ke la kontraŭslovenismo restas vivanta en la itala lando unulingvema. Pri tio atestas du leteroj datumitaj de 1961. Tiam la triesta organizaĵo 'Instituto por Defendo de Neplenaĝuloj' instigadis la slovenojn rezigni sendi la gefilojn al slovenlingvaj lernejoj. Nur malplimulto de la alpremitoj kuraĝis rezisti, kiel faris Mario MASE, la unua edzo de Anita PERIĆ, kiu estis jam laborcele elmigrinta al Aŭstralio. El Melbourne li respondis:

A.- "La fakto, ke ankaŭ mi persone deziras, ke Zora vizitadu la slovenlingvan lernejon, havas sian kaŭzon: kiam mia edzino estis malpli aĝa ol mia filino, ŝi kaj ŝiaj gefratoj [...] estis devigataj vizitadi la itallingvan lernejon. [...] Ilia nomo estis en tiuj tempoj ŝanĝita; Perich fariĝis "Pieri". Pro tiuj kaŭzoj kaj aliaj, mi deziras kaj volas, ke mia filino vizitadu la slovenlingvaj lernejojn. Ke almenaŭ ŝi povu lerni la lingvon kaj kulturon de tiu popolo, el kiu devenas ŝia patrino, al kiu tio estis malpermesata. Mi konscias pri la graveco de tiu ĉi decido, kiu havos sian pezon por la estonteco de la knabino kaj rilate tion mi certas, ke mi bone agas."

Cl.- Sed Anita PERIĆ baldaŭ laborcele elmigros al Svislando kaj ŝia filino Zora daŭrigos sian instruadon unue en la germana kaj alemana lingvoj en Zürich kaj poste en la franca en Ĝenevo. La svisa pluretneco respektoplena al la minoritatoj igos ilin pli konsciaj pri la graveco de la premado, al kiu estas submetita ilia etna grupo en Italio.

A.- Kaj ekde tiam Anita PERIĆ nelacigeble kolektis faktojn en la celo foje raporti en Esperanto pri la malfacila vivo de slovenoj en Italio. Ŝi amasigis sciigojn pri la situacio en la triesta regiono dum la habsburga regado sufiĉe favora, dum la militaj tempoj ĉiam malfavoraj, dum la faŝisma periodo ege mortiga, kaj pri la nuno. Ŝi flegadis la esperantigon de la elektitaj dokumentoj kaj por tio eĉ frekventis traduk-kurson ĉe Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fonds.

Cl.- Pro tio ŝia libro lingve kaj stile superas samtipajn nacilingvajn raportojn. Ŝi liveras al ni la frukton de multjara pliintimiĝo kun sia slovena hejmo, kien ŝi reiris vivi kun sia dua edzo Hans ALTHERR. Laŭ homaranisma spirito ŝi raportas pri tragikaj eventoj sen ilin dramigi, sen celi vekon de malamo kontraŭ la nekonscia barbareco de homoj, kiuj identigis sian landon kun la propra lingvo.

A.- La libron 'Ne facilas esti... sloveno en Italio' eldonis IKEL, tio estas Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj, kiel unuan volumon de antaŭvidita serio titolita Etnoskizoj. La kvalito de tiu unua verko enkondukas al promesplena entrepreno.

Cl.- La libro dividiĝas en du partoj priskriba kaj literatura. La unua disvolviĝas laŭ tre precizaj ĉapitroj: geografio, popolnombrado, historio, kultura vivo, instruado, politiko, rajtoj, amaskomunikiloj, ekonomio, religio, sporto, folkloro, kiuj, kiel la aŭtorino mem skribis "donas bazajn informojn al laŭeble vasta publiko tra la tuta mondo".

A.- "Eta portreto de la slovena lingvo" enkondukas la beletran parton de la libro, kiu konigas kelkajn slovenajn aŭtorojn. Ni menciuj ilin: France Prešern (1800-1849) vivis dum la habsburga regado. Lia verkaro estis efika stimulo por la slovena renaskiĝo.

Cl.- Ĉiuj aliaj verkistoj ankoraŭ vivas. Marko Kravos, nun direktoro de eldonejo en Triesto, naskiĝis en 1943 en itala koncentrejo, kie lia familio estis deportita de faŝistoj. De Boris Pahor naskiĝinta en Triesto en 1913 ni povas legi la emociigan novelon "Floroj por leprulo", kiu eternigos krimon de faŝistaj nigr-ĉemizuloj. La taglibraj notoj de Alojz Rebula naskiĝinta en 1924 raportas pri la vivo de slovenoj ne nur en Italio, sed ankaŭ en Usono kaj en Kanado. Ferruccio Clavara naskiĝinta en 1945 kreskis kaj studis en Belgio, kie lia patro vivis kiel ministro kaj revenis sian hejmlandon por okupiĝi pri elmigrintoj. Renato Quaglia naskiĝinta en 1941, ankaŭ revenis el Belgio. Miroslav Košuta naskiĝinta en 1936 estas nun la direktoro de Konstanta Slovena Teatro en Triesto. Filibert Benedetiĉ naskiĝinta en 1935 direktas la slovenan sektion de radio-elsendoj.

A.- Malmulton ni scias pri la tradukintoj de tiu beletra antologieto. Ni nur legas, ke Vinko Ošlak elslovenigis erojn el la taglibro de Alojz Rebula. Ĉu ankaŭ aliajn tekstojn li esperantigis? Tio ne estas indikita. Ĉu tio eble kaŝas modestecon de Anita PERIĈ ALTHERR?

Cl.- Ni ne ŝatas dediĉi tro da atento al lingvaj aŭ gramatikaj demandetoj. Por tia soci-politika raporto la lingvaĵo estas tute kontentiga, eĉ se kelkfoje oni renkontas nun kvazaŭ tradiciiĝintajn erarojn, kiel ekzemple la verbon "simboligas" anstataŭ la pli simpla "simbolas" (p. 97), la redundancan uzon de "propra" (p. 12). Tio estas detaletoj. Iom malagrabla estas kelkaj preteraroj, ĉefe en la prezento de la 15 sonetoj de France Prešern. Ĉiam la lasta verso de soneto ripetiĝas komence de la sekvanta, kaj nur per tiu ripeto ni povas kompreni, ke ni kelfoje troviĝas antaŭ kobolda sorĉaĵo: "uzante kreksoforton en angoro" tiel korektiĝas al "uzante kreskoforton en angoro" (p. 106-107), aŭ "Jen, donu vi okulardion vian" al "Jen, donu vi okulradion vian" (p. 109-110), sed ankaŭ tio estas detaletoj.

A.- Antaŭ ĉio, kio gravas, tio estas la enhavo mem. Pere de ĝi ni intimiĝas kun la problemaro de popol-minoritato, kun ties nefacila vivo kaj partopreno al translima beletra strebado.

Cl.- Sub la habsburga regado, kiu daŭris ĝis la unua mondmilito, la lingva praktikado disvolviĝis tute libere kaj kulminis en kultura renaskiĝo ege dinamisma en la komenco de la dudeka jarcento per la konstruo de plurcela kulturdomo en la centro de la urbo Triesto. Tiu

‘Narodni Dom’, speco de praulo de ‘Centre Pompidou’ pro la varieco de siaj celoj firmigis ia pozicion de la slovena lingvo en la regiono kaj progresigis ĉiurilate la edukan nivelon en la sloven-lingvaj lernejoj.

A.- Tuj kiam la habsburga regado ĉesis, la faŝisma partio celis la detruon de tiu palaco. Ĝia bruligo en 1920 kaŭzis nekalkuleblan damaĝon, ĉar la Narodni Dom entenis la plej gravajn instituciojn de la slovena minoritato: ĝi estis lernejo, teatrejo, koncertejo, banko, presejo, hotelo, restoracio, kafejo, gimnastikejo, biblioteko kaj arkivejo. En ĝi troviĝis la sidejo de diversaj societoj. Ĉio tio estis neniigita kaj neniue estis arestita, neniue estis juĝita. Kontraŭe. Baldaŭ sekvis sistema persekutado kontraŭ ĉio slovena fare de la faŝisma reĝimo. Eĉ la uzo de la lingvo en familia rondo estis kondamninda.

Cl.- Meze de Triesto malnova riz-konservejo baldaŭ transformiĝis al prizono kaj nazi-tipa ekstermejo, kie estis bruligitaj post teruraj suferoj ne nur plenkreskuloj, sed ankaŭ infanoj, nur ĉar ili naskiĝis slovene. Superis la kriojn de la hurlantaj viktimoj ĵetitaj vivaj en la bruligejon bruego de motoro kaj de radiolaŭtparolilo.

A.- Ankoraŭ nun latentas la persekutoj pere de malpurigo de monumentoj, de surstrataj slovenlingvaj stratnomoj kaj de tombejoj. Nereagas la aŭtoritatoj, kvankam la juro en la nuna itala respubliko kondamnas tiajn agojn. Fakte mankas preciza leĝo en la itala konstitucio por la protekto de la lingvaj malplimultoj. Ne sufiĉas la artikolo 6-a, kiu tekstas: "La Respubliko protektas per apartaj normoj la lingvajn malplimultojn".

Cl.- Sed elito ekkonscias pri siaj devoj kaj provas konsciigi la slovenlingvan loĝantaron pri ties rajtoj.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND. La venontan semajnon ni malfermos nian leterkeston. Ĝis reaŭdo !